

Heinrich Heine, Vin kantflugile, kara <i>tradukita de Kálmán Kalocsay</i>	Heinrich Heine, Sur flugiloj de la kanto <i>tradukita de Manfredo Ratislavo</i>	Heinrich Heine, Auf Flügeln des Gesanges
Vin kantflugile, kara, mi portus de tie ĉi. Sur Ganges-bordo lokon belegan ja scias mi.	Sur flugiloj de la kanto Al Gango vi lasu vin Forporti de via amanto Al plej bela lok', karulin'.	Auf Flügeln des Gesanges, Herzliebchen, trag ich dich fort, Fort nach den Fluten des Ganges, Dort weiß ich den schönsten Ort.
Ruĝflora ĝarden' tie kušas en lunlumita kviet', la lotusfloroj atendas je l' kora fratinet'.	Jen kušas en la lunbrilo Floranta lotus-ĝarden', Aperas en la trankvilo Sorĉigaj feinoj jen.	Dort liegt ein rotblühender Garten Im stillen Mondenschein; Die Lotosblumen erwarten Ihr trautes Schwesterlein.
Violoj ridetas, kisas, rigardas el stela ĉiel', fabelojn odorajn rozoj flustras al si ĉe orel'.	Karese la violetojn Subridi jen aŭdas vi, Rakontas odorajn sekretojn La rozoj inter si.	Die Veilchen kichern und kosen, Und schaun nach den Sternen empor; Und heimlich erzählen die Rosen Sich duftende Märchen ins Ohr.
Spionas la piaj, saĝaj gazeloj, saltas kun baŭm', la sankta river' lontane susuras per sia ŝaŭm'.	Gazeloj alsaltas maltime, Mallaŭte nur tra la aer' Aŭdigas de malproksime Susuro de l' sankta river'.	Es hüpfen herbei und lauschen Die frommen, klugen Gazelln; Und in der Ferne rauschen Des heiligen Stromes Welln.
Kaj tie ni por ripozo kušos sub alta palm', kaj trinkos amon, pacon kaj songos pri fea ĉarm'.	Ni volas ekkuŝi tie, En arbareto sub palm' Ripozi kaj am-ebrie Songadi en nokta kalm'.	Dort wollen wir niedersinken Unter dem Palmenbaum, Und Liebe und Ruhe trinken, Und träumen seligen Traum.
<i>Traduko de la Germana poemo "Auf Flügeln des Gesanges" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kalocsay, *1911 – †1976).</i>	<i>Traduko de la Germana poemo "Auf Flügeln des Gesanges" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).</i>	<i>Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17).</i>
Arg-540-1081 (2010-05-22 15:40:11)	Arg-540-1080 (2010-05-23 23:03:44)	Arg-540-1079 (2012-03-09 09:52:29)
	<i>El la „Libro de l' Kantoj“, lirika intermezo.</i>	<i>Aus dem Buch der Lieder, Lyrisches Intermezzo.</i>